



Kajeroj el la Sudo

BULTENO DE HISPANA ASOCIO DE LABORISTOJ ESPERANTISTAJ (HALE)

<http://www.educar.org/revistas/esperanto/k48.htm>

<http://esperanto.dragonfire.net/k48.htm>

Oni purigas en Pollando! (p. 7)



Naciismo, internaciismo, sennaciismo (p. 14-a)

La manifesto dudekjara (p. 5)

Kajeroj

el la Sudo



BULTENO DE HISPANA ASOCIO DE LABORISTOJ ESPERANTISTAJ (HALE)

Prezidanto: **Juan Antonio Cabezas Martínez,**
c/ Jabonerías, 6-3ºD,
ES30 001 Murcia (Hispanio)

Sekretario: **José Pina Tuells,**
c/ Stª Teresa, 22-2º CD,
ES30005 MURCIA

Libroservo: **María del Mar Guirao Gallego,**
Avdª Juan Carlos I, 22-8H
ES300800 Lorca

Redaktoro: **Jesuo de las Heras,**
Apartado 4461
ES30080 MURCIA

Kasisto: **José María Bernabéu Franco**
Gral. Primo de Rivera, 8
E-03360 Callosa de Segura,
ALICANTE (Hispanio).

Pretigas la Kajeron:
Provkorekto: **José Pina Tuells,**
Redakto: **Jesús de las Heras Jiménez**

Monsendo de kotizoj kaj abonoj al la konto
nº 1302 0412 86 0022655110 en libreta de
Caja Postal. Sen aldona kosto. La abono
kostas 1000 pesetojn aŭ 6 eŭrojn. Kvitancon
oni ricevos.

Kovrilo: *Robert Kaminsky purigas nomon kaj*
reliefon de Zamenhof en ties strato de Lodz, Pollando.

Enhavo

Redaktore	3
Informoj de la Prezidanto	4
La manifesto dudekjara	5
Spegulo ne mia de l' homaro	6
Imitinde ĉe agotago	7
Pri pasia reago al alies opinio	8
La 73-a Kongreso de SAT en Moskvo	10
Deklaracio de la Kongreso 73-a	10
Forpaso de Anton Zacharias	11
Limoj al la esprimlibero	12
Nacismo, internaciismo kaj sennacismo	14
Alvoko al ĉiuj haleanoj membroj de SAT	22
Enkonduko en muzikon	23

Ne subskribitajn
 artikolojn verkis
 la redaktoro.

**Oni povas
 reprodukti
 artikolojn,
 kondiĉe ke
 oni citu la
 originon.**

*Ni ne korespondos
 pri nepetitaj artikoloj.
 Tamen, ni klopodos
 publikigi ĉiun artikolo-
 lon kies enhavo estas
 interesa kaj ne mis-
 traktas iun ajn per-
 sonon.*

*Pri la enhavo de la
 artikoloj
 respondecas la
 aŭtoroj mem, ne la*

Redaktore:

Sendepende, libere, eĉ liberecane



Oni legis al mi strangan artikolon publikigitan en magazino **Laŭte!**, verkitan de nia iama respondeculo pri libroservo. Laŭ tiu artikolo, mi perfidas al *laborista kaŭzo*, HALE estas aro de malbonaj esperantistoj, kaj ĉiu leganto nia estas imperiisto hispana. Oni sendas nin ĉiujn al fek', finfine.

Mi sendis lakonan reagon al la redaktoro de tiu magazino, kaj ne plu dediĉis mian atenton al tiu infana afereto, sed kelkaj kamaradoj atentigis min pri tiu afero en la lasta kunveno de HALE, kaj mi nun opinias, ke oni devas diri ion ĉi tie pri tiu bedaŭrindaĵo.

La motivo por ĉagreno estis la publikigo ĉe niaj paĝoj de artikolo verkita de **falangisto** Fernando Letamendía pri *La provizordungaj perentreprenoj*. Strangaĵo estas, ke Snajpero, la reaganto, ne atakis la ideojn enhavatajn de tiu artikolo, sed la artikoliston mem, ĉar li apartenas -versajne- al Partio Falango Hispana. Kelkaj aliaj kamaradoj pli ĝentile atentigis nin pri tio, ke en *laborista* magazino oni ne devas permesi, ke tiuj *fiuloj* kunlaboru, eĉ verke.

Tio estus longa debato, sed mi nur referas vin al tiuj vortoj, kiuj legeblas en nia antaŭa paĝo, kiu koncize proklamas la filozofion eldonan de nia magazino: ni ne korespondos pri nepetitaj artikoloj, sed tamen ni **klopodos** publikigi ĉiun artikolon kies **enhavo** estas **interesa** kaj **ne mistraktas** iun ajn **personon**. Tio povas ŝajni tro restriktiva, ĉar

ĝi lasas en paperkesto artikolon tia, kia tiu de Snajpero kaj ties adekvatajn reagojn. Sed aliflanke tio asertas tian liberecon pri penso kaj preso, kia ne oftas en malkleraj etosoĵ. Eble S-ro Fernando Letamendía estas falangisto, kaj eble falangismo estas tiel fia, kiel oni ŝajnas kredi ene kaj malene de Hispanio, sed mi volonte preferas kontraŭstari tiajn homojn argumente ol perforte, pli bone racie ol bate.

Mi ne scias, ĉu konvenas al *laborista* ideologio aŭ ne, ke ĉiu povas publikigi sian opinion ĉe ni aŭ ne. Vere, mi ne havas ideologion. Mi preferas havi ideojn. Kaj vere ĉiu ideologio entenas kelkajn bonegajn ideojn, eĉ se tro ofte pakumitajn per perfortanta rubaĵo. Kelkaj eĉ diras, ke *ĉiuj ideologioj estas bonaj, sed homaj estoj perfidas ilin*. Mi male opinias, ke pro tio, ke oni estas *homaj*, oni kreas bonajn ideologiojn, kiujn trouloj aĉigas, kaj finfine ideologioj *korsetigas* ties kernajn bonajn ideojn, senvalorigante la tuton. Pro tio mi aŭdas ĉies ideojn, kaj publikigas tiujn, kiujn mi konsideras, ke utilas kaj valoras.

Aliflanke, ĉi tiu magazino estas bulteno de laborista asocio, kiu ankaŭ fieras nomi sin *kleriga*. Povas ne konveni al ĝiaj celoj aŭ sinteno la laboro de ĉi tiu redaktoro. Mi, sekve, metas mian oficon je ĝia dispo. Kiel dirite en numero 32-a, bona redaktado postulas kompletan sendependecon. Mi ne scias fari alimaniere. Oni sugestis, ke mi serĉu modelon en aliaj esperantaj laboristaj magazinoj, kiel **SAT-Amikaro**, **SLEA-informilo**, aŭ **Liberecana Ligilo**, sed mi opinias, ke la franca, sveda aŭ belga realoj estas malsamaj al tiu de Hispanio.

Do, tion, kion mi povas oferti al la haleanaro, enhavas la dek punktoj de mi senditaj al redaktoro de **Laŭte!**, kaj kiun mi publikigas en paĝo 8-a.

Amike, sed kamaradece,

Jesuo

Informoj de la prezidanto

Dum mi estas Prezidanto de HALE kaj la HALEanoj volas, ke **Kajeroj el la Sudo** defendu

Estimataj samideanoj:



Kiel Prezidanto de HALE mi devas refuti la atakojn de Snajpero, kiam li atakis al ĉiuj haleanoj.

Min surprizis la artikolo de Snajpero: li ne argumentis, nur insultis li.

Ghandi, Monstesquieu, Voltaire, Fray Bartolomé de las Casas, Einstein, Bertrand Russell havis ion similan: ili havis ideojn.

Mi pensas ke ne estas necese insulti por defendi oniajn ideojn: argumentoj sufiĉas.

Min surprizis la artikolo de Snajpero: li skribis, ke li konsentis pri la argumento de la falangisto. Ne atakas li la argumentojn de la falangisto (li povis diri, ke la falangisto ne havas moralan aŭtoritaton ĉar se ili regis dum 40 jaroj en Hispanio, ili povis doni la entreprenojn al la laboristoj, kiel diris la programo de Falango).

Li konsentis kun la falangisto sed atakis per insultoj al la haleanoj.

Min surprizis la artikolon de Snajpero: li diris ke HALE estas malpuriga.

Se nia HALE estas malpuriga ni supozas ke Snajpero estas puro (kiel la naziistoj) sed dum mi estas Prezidanto de HALE la pordoj estas malfermitaj al la homoj *malpura*: anarĥiistoj, masonistoj, rosacruzistoj, virinoj, ne blankaj viroj, blankaj viroj, ktp.

la liberpenson sen insulti eĉ la ideojn de Snajpero kiam li skribas kun ideoj sen insulti.

Finfine mi volas diri ke **Kajero el la Sudo** defendas la liberpenson: Musolini diris ke li estas socialista (sed la socialistoj estis en la malliberejo). Hitler diris ke li estas socialista (sed la komunistoj, anarĥiistoj, liberpensuloj estis en la koncentrejo), Stalin ankaŭ diris, ke li vivas en socialisma lando (sed multaj socialistoj mortis en la koncentrejo) sed ĉiuj atakis la liberpenson kaj la liberajn ĵurnalojn.

Finfine Franco diris ke li ŝatus regi kun liberpresoj! Sed la ĵurnaloj, dum la epoko de Franco, ne estis liberaj.



Ĉu vi defendas la liberpenson? Ĉu vi defendas la liberĵurnalojn?

Se la respondo estas jes, vi komprenas ke la redaktoro publikigis la artikolon de la falangisto kvankam nek li nek mi estas falangistoj eĉ se ni ne ŝatis publikigi la artikolon.

Sed la falangisto ne insultis sed argumentis kaj se vi volas luktadi kontraŭ rasismo, kontraŭ faŝismo, vi devas havi argumentojn kaj ne insulti.

Se mi eraras bonvolu konvinki min per argumentoj.

LA MANIFESTO DUDEKJARA

(nefermita letero)

Karaj geamikoj,

En la adreslisto de la KCEkomputilo mi trovis nur viajn retadresojn, kiel tiujn de



personoj aŭ establoj kulturpolitike motivitaj sur la raŭma vojo. Al pli multaj mi volas sendi ĉi tiun leteron, sed eble tion faros «Heroldo Komunikas». Pormomente temas pri strikte privata meditaĵo.

Estis la lasta tago de julio 1980 kiam surpaperiĝis la teksto de la dokumento pri kiu oni parolas plej multe en la historio de Esperant(i)o, post la Deklaracio de Bulonjo ĉe Maro. Se la nova PIV estus atenta pri la efektiva lingvouzo, ĝi certe enhavus la kapvorton *Raŭm-* kaj de ĝi «raŭmismo». Mi ne scias ĉu la difino estos objektiva. Persone, mi akceptus la sekvan: «Kultura kaj socia tendenco kiu vidas en Esperanto ne nur komunikilon, sed ankaŭ artan perilon kaj identigilon. La esperantistaro estas tial sociologie difinita kiel senteritoria lingva kolektivo.»

En 1935, dum sia prelego en la Roma UK, Gaston Waringhien rimarkis: «Vi scias, ke multaj laikoj, eĉ favoraj al la ideo de internacia lingvo, konceptas ĉi tiun kiel nuran helpilon por komercaj, sciencaj, diplomaciaj rilatoj, sed rifuzas al ĝi ĉian rolon sur la beletra kampo; eĉ inter niaj vicoj ne mankas personoj por partopreni tiun opinion, kaj vi certe povis, same kiel mi, aŭdi unu aŭ alian el niaj eminentuloj deklari, ke ni ridindigas nin per nia literaturo, aŭ ke niaj poetoj simple endanĝerigas la tutan aferon». Waringhien devis defendi por nia lingvo la rolon de arta perilo, preskaŭ duonjarcenton post la Unua Libro, je pli

ol 25 jaroj post la unuaj Internaciaj Floraj Ludoj! Ĉu ni do miru, hodiaŭ, se ni aŭdas unu aŭ alian el niaj eminentuloj (?) deklari, ke ni ridindigas nin per nia projekto de Esperanta Civito, kaj ke la raŭmistoj simple endanĝerigas la tutan aferon? Ni spertas, kontraŭ la rolo de identigilo, la saman antaŭjuĝon kiun spertis niaj beletristoj rilate al la rolo de arta esprimilo.

Sed la lingvo ne estas nur komunikilo. Ĝi estas fenomeno multe pli kompleksa, ol supozas la kultantoj de la Fina Venko.

Raŭmo fiksas revolucian koncepton: la rolo de internacia helpilingvo povas sufiĉi por la «Standard English», sed ne por Esperanto - akorde kun la opinioj de Zamenhof, cetere.

Se en Raŭmo estis formulata nova difino pri la lingvo, dum la sekvaj dudek jaroj laboris pluraj, eĉ multaj homoj por aktualigi la difinon pri la lingvanaro. La transiro de movado al komunumo, kaj de komunumo al civito, markas la ĉefajn etapojn de tiu procezo, almenaŭ laŭ nokia indiko.

Raŭmismo anticipis per jardeko la historion. Depost la okdeknaŭa ni spertis makrosocie nian pravon. Ene de tri jaroj, per la akcepto de nia literaturo fare de PEN Club (septembro 1993) kaj per la inkluzivo de nia «lingva grupo» fare de la Universala Deklaracio de Lingvaj Rajtoj (junio 1996), la makrosocio konsentis pri Esperanto kiel arta perilo kaj kiel identigilo.

Paralele al la sociologia maturiĝo de nia diasporo, evoluanta al subjekto de internacia juro, la samon spertas aliaj identecoj: ĝuste ĉisemajne en Prago la kvara cigana mondkongreso adoptis propran flagon, propran himnon, elektis

parlamenton kun membroj el 45 landoj, kaj el ties oficiala sidejo (en Bratislavo), ili petos de UN la agnoskon kiel senteritorian subjekton de internacia juro...

Kiel normale en ĉi tiuj kazoj, la novaĵo vekas kontraŭstaron. La tipo de kontraŭstaro, kiun ni spertis kontraŭ la Manifesto en la 80aj jaroj, kaj kontraŭ la projekto de Karolovaro nuntempe, estas la plej primitiva. Ĝi enhavas la plej grandan eraron kiun oni povas fari en politiko: strebi al la demonigo de la kontraŭulo. Tiun eraron, per si mem tre stultan, faris eĉ homoj kiujn mi konsideris inteligentaj. Ili fakte kontribuas al la disvastigo de la raŭmismo, kaj akcelas la naskiĝon de la Esperanta Civito, male al tio kion sia blindiga orgojlo esperas.

Ni ĉerpu ĝuste el tiaj atakoj novan energion. La tempo laboras por ni. Kaj ni laboru por la nova Esperantio. La raŭmismo sintezis kaj aktualigis la ideologian elanon kaj de la homaranismo kaj de la sennaciismo. Ne hazarde ni ofte mencias, apoge al raŭmismo, la (nun) faman leteron de Zamenhof al Kofman, kaj ne hazarde la saman leteron tiel glosis Gaston Waringhien: «Tio estas bona argumento por la sennaciistoj, kiuj ĝuste celas konsistigi tiun homan grupon» (en «Lingvo kaj Vivo», 1959, p. 359).

Ankoraŭ unu penson permesu. Survoje al ĉiu promesita lando ŝvebas deŭteronomeska malbeno. Neniu miru, ke ĝuste Mozeo ne eniris Palestinon. Kaj estos pli ol nature, se ne ĉiuj el ni sukcesos vidi la publikigon de la Konstitucio de la Esperanta Civito.

Dezirante agrablan daŭrigon de la some-ro, kore salutas

Giorgio Silfer
2000 07 30

Spegulo ne mia de l' homaro

al (prefere kontraŭ) sendependistaj novfaŝistoj

korsikoj baskoj kaj aliaj bretonoj
sendependiĝo mia pugo
nur kadavroj por faŝistoj
postmodernismo foje
ne bremsas novnaziismon
banditoj gangsteroj
falsaj revoluciuloj
mensoguloj
napoleonidoj
alkaponidoj
hitleridoj
rasistoj
simplaj
stultaj
murdistoj
torturistoj teroristoj
mi fajfas je vi
mi fekas je vi
ja reakcia
ĉar esence eĉ historie moderna
eble ankoraŭ sennaciista mi?
jes

Laurent Septier
(Publikigita en **La**



Imitinde, ekz. (sed ne nur) ĉe ago-tago

Lokaj esperantistoj el la urbo Lodz, Pollando pruvis per sia agado, ke samideanoj devas senti sin devigitaj zorgi pri ofte forgesataj ZEO objektoj.

La 16-an de septembro je ĉeesto de invititaj ĵurnalistoj ili purigis bronзан tabulon kun bareliefo de Ludoviko Zamenhof pendantan ĉe la strato nomita pri la iniciatinto de nia lingvo. Purigitaj estis ankaŭ ĉiuj strataj tabuletoj laŭlonge de lia strato. Tiu ĉi agado okazis dum la 81-a datreveno de dono al la unua strato en Pollando nomon de L. Zamenhof kaj estis samtempe bona okazo por propagandi per flugfolioj la ideon de internacia lingvo kaj rememorigi al loĝantaro pri ekzisto de E-movado en la urbo.

La evento, malgraŭ ke sen iu granda impeto, fruktis per intervjuoj en du lokaj brodkastejoj, raporto en loka televidilo kaj lokaj gazetoj kaj anonco de pli granda artikolo en la gazeto. Esperantistoj el Lodz pere sia agado volis

ankaŭ alvoki fondintojn de ĉiuj tabuloj kaj monumentoj al zorgado pri ili. Ili ankaŭ insiste persvadas al samideanoj el tuta Esperantujo imitadon.

En nomo de lodzaj esperantistoj

Aleksander Kaminski

esperant@ikki.com.pl estrarano de
Pola Esperanto Asocio Filio en Lodz

ul. Próchnika 1, PL 94-108 Lodzo,
Pollando

fonto: ret-info



W pełnym blasku

Robert Kamiński mył tablicę pamiątkową ciepłą wodą z odrobiną detergentu by zmyć kurz i spaliny, ale nie zniszczyć patyny.

foto: MiG

Pri pasia reago al alies opinio

Pri la artikolo aperinta en la numero 149-a de *Laŭte* verkita de Snajpero kaj titolita *Faŝistoj, hipokriteco kaj aliaj fiaĵoj*, la redaktoro de *Kajeroj el la Sudo* deziras klarigi la jenajn punktojn:

1. En nia revuo **ne estas, kaj neniam estos**, cenzuro. Ĉiuj vidpunktoj estas defendeblaj, kondiĉe ke oni honoras kelkajn principojn, difinitajn en la paĝo 2-a de nia magazino, nome, *ke la enhavo estu interesa kaj ne mistraktu iun ajn personon*.
2. Reagoj al artikoloj de ni publikigitaj estas bonvenigitaj, kondiĉe ke tiuj principoj aluditaj en 1 estas respektataj. Tio venas el nia **respekto al liberecoj pri penso kaj esprimo**.
3. Faŝismo ne estas limigita al iuj ajn apartaj sigloj aŭ politikaj partioj. Laŭ la tria difino de la Vortaro de la Hispana Akademio, ĝi estas *excesivamente autoritario* (troe aŭtoritatisma). Tiusence ni ne estas, kaj neniam estos, faŝismaj. Laŭ la aliaj du sencoj, *ana aŭ rilata al faŝismo kaj partiana al ties doktrino aŭ movo socia*, ankaŭ ni ne estas faŝismaj.
4. Laŭ historio, falangismo ne helpis Fransiskon Frankon puĉi en Hispanio, sed li uzis ĝin -same

kiel li uzis la Katolikan Eklezion, la hispanan armeon, la neŭtralecon de la demokratioj de la tiama mondo kaj ĉiujn ajn aliajn rimedojn por siaj celoj. Tiusence la Falango Hispana estas tiom fia kiel la menciitaj instancoj, sed ne pli. Postuli, ke nek pastro, nek armeano, nek demokratioj angla, franca aŭ usona povas publikigisian opinion en niaj paĝoj ŝajnas al ni troa kaj nerilata al racio.

5. La tiel nomata *falangisman doktrinon* ne difinas aŭ laŭdas niaj paĝoj.
6. La nociojn **nacio, ŝtato, kulturo, patrio** kaj ties ismojn oni pridifinis kaj diskutis en kelkaj artikoloj publikigitaj en niaj paĝoj en kelkaj artikoloj de kelkaj aŭtoroj, kiuj penis klarigi ilin. Ŝajniĝi, ke oni konfuzas ilin estas manko de respekto al la diversaj aŭtoroj, kiuj evidente ne meritas tian mistrakton. Pro tio la snajpera artikolo neniam publikiĝus en niaj paĝoj sen la koncerna polurigado antaŭa.
7. Eraro estas persista planto, kiu aperas sur ĉiu kampo. Eble Sinjoro Snajpero sukcesas trovi senmisprantan paĝon en sufiĉe konataj publikaĵoj kiel *The Times, El País, El Mundo, Le Monde, The Washington Post,*

L'Osservatore Romano, aŭ la ĵurnalo de sia urbo. Mi ankoraŭ ne sukcesis pri tiu tasko. Sed oni notu, ke tiujn altkvalitajn periodaĵojn de mi ĵus cititajn pretigas ĉiutage elstaraj profesiuloj de la ĵurnalista arto, kaj ilia laboro estas kontrolita profesie de la koncernaj spertuloj.

Kajeroj el la Sudo estas pretigita de amatora redaktoro kun plenpleno da iluzio, sed nulo da profito, same kiel la koncerna kontrolanto. Neeviteblas, ke misprintoj aperas, kaj ni petas de la bonvolo de la legantaro, ke oni trovu la ekzaktan sencon de la mesaĝo de ni celata ĉiufoje. Se tio ne estas la kazo, ni bonvolas sugestojn kaj proponojn, sed akraj atakoj sencelaj maltrafas nian komprenon, kaj sekve restas senrimarkataj.

8. Kelkaj el niaj aŭtoroj jam argumentis pri la krimaj kaj murdaj sekvoj de naciismo kaj perforto, kaj ankoraŭ neniu sukcesis malpravigi ilin. Sennaciismo ne estas religio laŭ ni, kaj ĝi ne havas magian trajton. Nur manko da naciismaj aspektoj prezentas ĝin al ni sufiĉe alloga. Eble naciismo enhavas virtojn ĝis nun kaŝitajn al nia kompreno. Pro tio, mi elkore invitas naciistojn pruvi, ke tiuj virtoj vere ekzistas.

9. Post apartigo el ĉiuj pasiaj frazoj el la artikolo de mi prikomentata, restas nur tiu ĉi frazo: *Ne kritikos* [verŝajne la aŭtoro de la artikolo, S-ro Snajpero] *la enhavon de l' artikolo, ĉar mi ankaŭ kontraŭas tiajn entreprenojn, kapitalismajn ilojn por plej efika ekspluatado*. Sekve, estas rimarkinde, ke la kondamnanto de la apero de tiu artikolo en laborista magazino koincidas kun ties opinio, sed tamen li neniam sendis al ni tiurilatan artikolon kun simila kvalito. Male, li anatemis la iniciaton, same kiel la Inkvizicio ne refutis la teoriojn de Galileo Galilei, sed nur atakis, minacis kaj anatemis lin, pro tio ke liaj ideoj ne kongruis al la tiamaj modaj ideoj.

10. Mi kondolencas al kamaradoj kiuj, pro nescio de la historio ĵusa de Hispanio, estas senhelpe mensogataj de artikoloj pasiaj similaj al tiu de mi komentata, kiu ne ofertas eĉ unu referencon al dokumento -historia aŭ ne- sur kiu la aŭtoro apogas sin. Ĝia stilo ŝajnas al mi manipulanta, maljusta kaj religiema pro sia dogmeco, sed malklera. Mi esperas, ke legantoj eltiru siajn proprajn konkludojn el la atenta legado de tiu artikolo kaj el tiu-ĉi respondo mia.

Kamaradece,

Jesua

73^a-SAT-KONGRESO EN MOSKVO

Inter la 15-a kaj la 23-a de junio 2000 okazis la 73-a kongreso de SAT en Moskvo (Rusa Federacio). La kongreson partoprenis entute 125 personoj. Krom la laborkunsidojn (entute 5) la gekongresanoj povis ĝui diversajn tre kvalitajn prelegojn, kulturajn programerojn, ekskursojn, kaj sperti jam tradicie konatan kamaradecan kaj familiecan etoson. Dum siaj seriozaj laboroj, en kiuj partoprenis ĉiuj gekongresanoj (kun la voĉdono de nur SAT-membroj), la kongreso preparis jenan deklaron (kun celo traduki ĝin en naciajn lingvojn kaj liveri ĝin al la naciaj amasmedioj):

DEKLARACIO DE LA 73-A SAT KONGRESO EN MOSKVO (12-23.07.2000)

La 73-a SAT-kongreso, okazinta de la 15-a ĝis la 23-a de julio en Moskvo (Rusio) :

- 1) - Firme opiniante ke eĉ la plej komplika konflikto ĉiam havas alternativan pacan solvon, kondamnas ĉiajn militojn kiel rimedojn por solvi iajn ajn problemojn de la nuna mondo, i.a. la militon en Ĉeĉenio.
- 2) - Kondamnas ankaŭ iun ajn terorisman, ĉu individuan, ĉu ŝtatan, ĉie en la mondo.
- 3) - Subtenas ĉiujn pacbatalantojn en la mondo.
- 4) - Kondamnas rompon de la Biŝkeka konvencio, ĉar tiel estas malhelpata libera senviza vojaĝado kaj libera kontakto.
- 5) - Alvokas ĉiujn registarojn en la mondo respondi taŭge al la civitanaj

movadoj por enkonduki en la realan, tamen nepran tutmondiĝon, pli kaj pli da demokratio.

- 6) - Agnoskante, ke la kapitalismo, surbaze de la ekspluatado de la homoj, socio kaj naturo por profito de nur kelkaj homoj, estas la ĉefa kialo de niaj sociaj,

Jen la universitato de Moskvo



politikaj kaj ekonomiaj problemoj, subtenas la nunajn disvastigantajn movadojn, kiuj manifestacias diverslande kontraŭ tiaj internaciaj instancoj kiel Monda Banko, Internacia Mona Fonduso, Monda Organizo por Komercio, kies kunve-

noj estas nedemokratie komisiataj kaj kiuj strebas al transformiĝo de ĉio (eĉ de la vivo mem) en vendeblaĵojn.

- 7) - Subtenas la formiĝon de forta kaj kreema nehierarkia movado celanta al socio, en kiu la homoj ne ekspluatu kaj ne subpremu la aliajn homojn, komunumojn kaj naturon, cele al la mondo, kiu baziĝu sur la solidareco, kooperado, demokratio kaj ekologia vivtenado.
- 8) - Subtenas la batalon de neregistaraj organizoj en Rusio por restarigo de malfonditaj decidpovaj ŝtataj mediprotektaj kaj arbarmastrumaj instancoj; tio estas nepra, eĉ ne sufiĉa kondiĉo por konservado de biodiverseco kaj naturaj heredaĵoj.

FORPASO DE PROFESORO ANTON ZACHARIAS (SLOVAKIO, 14-01-1939, 13-09-2000)

Antaŭ kelkaj tagoj trafis nin la malfeliĉa novaĵo de la subita forpaso de Profesoro Anton Zacharias, en Košice (Slovakio). Li troviĝis inter la plej elstaraj profesoroj de Esperanto laŭ la rekta metodo, kiun li perfekte kaj alloge mastris. Tre populara en tuta Eŭropo, animo de la movado, sindonema homo, havante grandegan kulturtrezoron. Li perfekte regis krom la slovakajn kaj esperantan lingvojn, la ĉeĥan, polan, hungaran, rusan kaj germanan. Lia forpaso estas granda perdo por la slovakaj movado kaj por la granda kvanto da amikoj kaj admirantoj kiujn li havis, ĉar homoj tiaj ne estas facile anstataŭeblaj kaj forgeseblaj.

Jen la alparolo de s-ano Milan Zvara, Prezidanto de Regiona Esperanto-Societo en Poprad, okaze de la entombigceremonio de Anton Zacharias, la 20-an de septembro 2000, en Košice:

Estimataj gepartoprenantoj!

Permesu al mi, ke mi nome de esperantistoj adiaŭu nian longjaran amikon kaj kolegon kaj samtempe mi danku al li pro longjara agado de disvastigado de la Internacia Lingvo Esperanto ne nur ĉe ni, sed ankaŭ en eksterlando. Anton estis eminenta instruisto pri la Internacia Lingvo aplikante rektan metodon ĉe instruado, kio ebligis havi geaŭskultantojn, kiuj apartenis al pluraj naciecoj. De la jaro 1972-a regule instruis en Someraj Esperanto-Lernejoj en Slovakio. Li

gastinstruis en similaj lernejoj en Pollando kaj Hungario dum kelkaj jaroj. Ĉi jare de la 4-a ĝis la 17-a de aŭgusto en Poprad li gvidis kurson por progresintoj, kiujn partoprenis esperantistoj el Francio, Italio, Anglio, Pollando kaj Slovakio. Ni ne pensis ke tio okazas la lastan fojon. Li fariĝis esperantisto en 60-aj jaroj. Aktive laboris en la Tutslovakiaj organizaĵoj, en regiona societo kaj en E-Klubo en Poprad kaj Košice. En la lastaj jaroj ĝis 1994-a li laboris profesie en Slovaka Esperanto-Asocio, kies sidejo estis en Poprad. Li estis ŝatata instruisto ne nur ĉe ni, sed ankaŭ en eksterlando. Ekzemple, li vidis la kursojn en Pollando, Hungario, Turkio, Germanio, Hispanio (kelkfoje, laste en julio ĉi-jare), Bulgario, kaj dum kvar jaroj po kelke da monatoj instruis en Litovio. Li partoprenis multajn internaciajn Esperanto-aranĝojn. Li dediĉis sian tempon ankaŭ al instruado de Esperanto al pupistoj kaj poste ilin akompanis en Danlando. Multfoje sin prezentis ne nur en radio, sed ankaŭ en televido. Li estas aŭtoro de la artikoloj pri historio de slovakaj urboj kaj burgoj, kiuj aperadis en Esperantisto Slovaka. Li regule partoprenis festojn okaze de Sanka Nikolao, kiujn organizas esperantistoj el Poprad ĉiujare en montara vilaĝo Murzasichle. Li ĉiam prezentadis Sanktan Nikolaon, kiu disdonadis donacetojn.

Kara Anton, dankon al vi nome de Regiona Societo Esperanto kaj nome de Slovaka Esperanto-Federacio en Poprad. Malgraŭ via forpaso, vi restos en nia memoro.

*Fonto: ret-info
eventoj@hungary.net*

Limoj al la esprimlibero

kadre de laborisma Esperanto-organo, kaj la fenomeno de nova falango.

*Refuto al la ofenda artikolo **Faŝistoj, hipokriteco kaj aliaj fiaj**oj aperita en revuo **Laŭte!***

Antaŭ kelkaj monatoj mi havis neformalan renkonton kun membroj de politika partio nomata Falango Hispana. La sola mencio de tiu nomo alportis min, simile al aliaj laboristoj, la suspekton pri la faŝisteco de ĝiaj uzantoj, pro la apogado de konfesitaj falangistoj al la diktatora reĝimo de Generalo Franko. Tamen mia suspektemo iom post iom malaperis dum ni babilis pri diversaj temoj, ne nur pri la famaj 40 jaroj de faŝista diktaturo en Hispanio, sed ankaŭ pri la tiamaj sociekonomiaj problemoj, kaj rilate la proponaron de Falango favore al: rekta demokratio, maksimuma povo por la municipoj; **respekto al la ekzisto kaj funkciado de la politikaj partioj**; laborista regado de la privataj entreprenoj, starigo de sindikato naciskala kaj politike plurtendenca kies roloj estus la kontrolo de la produktado, ellaborado de laborleĝoj kaj sociaj regularoj, ŝtata kontrolo de la kreditsistemo kaj sociigo de la urbaj terenoj surkonstrueblaj, cele al evito de la spekulacio; planoj por efika kaj hominda reintegrigo de la sendomuloj kaj almozuloj en la socion; redistribuo de la kamparaj bienegoj; ŝtato bazita sur la konsento libervola kaj neperforta de siaj komunumoj; ktp. Ankaŭ ili defendiĝis kontraŭ la kulpigo de faŝisteco, argumentante ke Franko, profitante

politike streĉitan situacion, perforte ŝanĝigis ties politikan idearon, enkarcerigis kelkajn falangistojn kontraŭajn al li, koruptis aliajn per politikaj postenoj, kaj tutmondigis la ideon pri plena koincido de la frankismo kaj la falangismo en Hispanio. Resume, ke Franko perfidis la Falangon, persekutis la aŭtentajn falangistojn, kaj transformigis la originale progreseman partion en enton vakuitan de siaj socitransformigaj ideoj je la mezuro de la diktaturaj interesoj. Aŭdinte tiun version mi nek fidis nek malfidis pri ili, sed pensis ke eble estus riĉige por nia kolektivo ekkoni la sociekonomiajn proponojn de tiu partio. Post nelonge atingis miajn manojn la pripolemikota artikolo de la falangisto Fernando Letamendía pri la ekspluatado kapitalisma de la provizordungaj perentreprenejoj, enhavante proponojn de bojkoto al ili kaj por ties malaperigo. Per la argumento de la enriĉigo de la laborista debato, kaj **ke ŝajne, Falango Hispana ne plu estas, eble neniam estis, kontraŭdemokratia grupo**, kaj konstante ke la teksto menciita enhavis absolute nenion favoran al la faŝismo, la politikan maltoleremon, kapitalismon, aŭ rasisman (ĉiuj el ili konsiderendaj kvazaŭ nigraj bestoj de nia kolektivo), mi sukcesis konvinki la redaktoron de

Kajeroj el la Sudo publikigi la artikolon ene de la numero 46-a.

Post kelkaj monatoj (jam aperinta la numero 47-a) kaj kun granda ĝeno, mi ricevis la novaĵon pri ekstarigo de akra kampanjo kontraŭ ambaŭ, la estraro de Hispana Asocio de Laboristoj Esperantistaj (HALE), kaj la stabanoj de sia organo, **Kajeroj el la Sudo**, pro la publikigo de artikolo de iu falangisto. Ĉu ekzistis sola falango (tiu, kiu servis Frankon), ĉu ankaŭ alia kun malsamaj trajtoj?, jen la demando de samideano el Germanio, kiun mi jam respondis je la unua parto de ĉiteksto. Rilate la alian reagon aperitan en **Laŭte!** Kaj rubrikita de Snajpero, mi opinias ĝin sennecese ofenda kaj damaĝa por la esprimolibero. Kiel mi antaŭdiris, leginte la artikolon atakitan, estis en tiu neniu ero de ajnaj faŝismo aŭ politika maltoleremo. Samlingvano Snajpero kondamnis la esprimon *forta ŝtato* kaj la konfuzan uzon de la terminoj *ŝtato* kaj *nacio* aperintaj en la teksto, montrante ilin kiel pruvojn de la faŝisteco de la verkinto, kaj, samtempe, de la maldececo de tiuj, kiuj publikigis ĝin *asocio de malbonaj esperantistoj eble ne laboristaj*. Refute al tiaj pruvoj mi diras ke, unue, la esprimo *ŝtato forta* ne estas ekskluzive uzita de la faŝistoj, sed ankaŭ de kelkaj demokratoj okaze de siaj politikaj intervenoj, kaj due, la konfuzigan uzon de la terminoj *ŝtato* kaj *nacio* estas konstanto en plej demokratiaj landoj, kiuj havas miskomprenojn inter siaj centraj estraroj kaj siaj suverenismaj regionoj.

Mi pardonpetas pri la preseraroj aperintaj en la atakita teksto, sed ankaŭ

mi invitas ĉiujn relegi ĝin atente celante konstati ke ties verkostilo tute estas nek fuŝa nek rubaĵo, sed sufiĉe bonkvalita. Domaĝe ke neniu el la kritikintoj pritaksis la proponojn de la artikolo rilate la provizordungajn perentreprenojn, sed tamen ili direktis siajn atakojn kontraŭ la verkinton mem kaŭze nur de lia politika aneco. Ne estus la unua fojo kiam oni trovas trezoron en naŭziga loko, tial, eĉ en la kazo ke la verkinto estus vere faŝisma, oni pritaksu siajn sugestojn antaŭ ol kondamni lin, aĝi alimaniere ne decus en klerigitaj demokratiaj medioj amantaj de la esprimolibero kaj ĝi onin morale similigus al la faŝistoj mem. Krome, mi kredas ke **antaŭ la homaj rajtoj ni ĉiuj estas egalaj, kaj ne iuj pli egalaj ol aliaj.**

Rilate la kontraŭnaciismon aŭ la hispanan naciismon atribuitajn al nia revuo, mi klarigos ke en HALE ekzistas pluraj tendencoj rilate centroregismon, suverenismojn regionajn kaj sennaciismon. Mi mem kredas, ke estus konvene kaj eble interharmoniigi la tri tendencojn en Hispanio kaj mi volonte akceptus ke iu regiono de Hispanio aranĝus referendumon por difini sian estontecon rilate la ceterajn partojn de la Ŝtato, eĉ mi kredas (eble tro utopie), **ke ni, la esperantistoj de Hispanio, devos kiel eble plej frue proponi serioze ke en tiu ĉi ŝtato oni reformu la konstitucion tiel ke la oficiala lingvo de nia lando estos Esperanto anstataŭ la hispana** por eviti la suspektemojn de la popoloj kiuj uzas denaskajn lingvojn malsamajn de la oficiala hispana en siaj teritorioj.

Samideane via,

José Pina Tuells

Naciismo, internaciismo kaj sennaciismo

de *Jakvo Schram*

La plej malvarmaj el ĉiuj monstroj

Ie en la mondo ekzistas ankoraŭ popoloj kaj brutaroj, sed ne ĉe ni, karaj fratoj: ĉi-tie troviĝas



ŝtatoj. Ŝtato? Kio tio estas? Nu! Malfermu la orelojn, ĉar nun mi diros mian vorton pri la morto de l' popoloj.

Nomiĝas ŝtato la plej malvarmaj el ĉiuj malvarmaj monstroj. Malvarma estas ankaŭ ĝia mensogo;

kaj ĉi tiu mensogo rampas el ĝia buŝo: *Mi, la ŝtato, estas la popolo*. Mensogo ĝi estas! Kreantoj estis tiuj, kiuj kreis la popolojn kaj drapiris ilin per la kredo kaj la amo: tie ili servis la vivon.

Detruantoj ili estas: ili metas kaptilojn por multaj kaj nomis ilin ŝtato: ili drapiris ilin per sabro kaj cent sopiroj.

Kie ekzistas ankoraŭ popolo, tiu ne komprenas la ŝtaton kaj malamas ĝin kiel malican okulon kaj pekon kontraŭ moroj kaj rajtoj.

Ĉi-tiun signon mi donas al vi: ĉiu popolo parolas sian idiomon de bono kaj malbono: ĉi tiun lingvon la najbaro ne komprenas. Sian lingvon ĝi inventis laŭ moroj kaj rajtoj. Sed la ŝtato mensogas en ĉiuj idiomoj pri bono kaj malbono; kaj kion ajn ĝi diras, ĝi mensogas - kaj kion ajn ĝi havas, ŝtele ĝi ĝin ekhavis.

Ĝis ĉi tie la eltiraĵo el **Tiele parolis Zarastustra** de Friedrich Nietzsche

Kiam oni legis librojn pri la naciismo, ĉiuj verkistoj situigas la komencon, de la naciisma ideo, ĉe la Franca Revolucio de 1789; aŭ kiel Francis Fukuyama, kiu referencas al la usona historio, kaj pro tio parolas pri la jaro 1776. Nur ĉe Eŭgeno Lanti, unu el la fondintoj de SAT, mi legis pri naciismo komenciĝinta jam ĉe la antikvaj egiptoj, kaj kvankam la teorio de Lanti estas ege interesa, mi tamen ne tro ofte prenis partojn el lia tezo kiu rilatas al

naciismo, ĉar laŭ mi Lanti intermiksas naciismon kun identeco.

Naciismo, laŭ la plimulto de filozofoj, datiĝas el la 18a jarcento kaj celis grupigi/dislimgi teritorion kun enloĝantaro, kiu havas, aŭ pri kiu oni pensas, ke ĝi havas, senton da komuneco. La kreado de nacioj okazis samtempe kun la industria revolucio, dum la kreado de - sub influo de Adamo Smith - moderna kapitalisma ekonomiko.

Naciismo pro tio, almenaŭ laŭ mia kompreno, estas reakcia koncepto, kaj kvankam antaŭ la dua mondmilito kelkaj konataj progresemuloj defendis la naciisman ideon en Belgio, — la plej grava ekzemplo de defendanto de la naciisma idearo estis sendube Jef Van Ekxtergem, la famega marksisto, kiu mortis pro siaj ideoj, — post la milito, neniu sin mem respektanta progresemulo, kuraĝis plu defendi naciismon, ĉar naciismo estis tro multe ligita kun faŝismo. Ni povas diri ke naciismo estas la frato de faŝismo.

Male, la progresema penso nuntempe plene situigas en la liberal - demokrateca penso.

Liberala demokratio ? Jes, ĉar la dimensio de la industriigita liberala ekonomiko bezonis, precipe en la komenco, krei unuojn, suface grandajn, por esti konkurencivaj en la libera mondmekato, pro tio la esprimo *liberala demokratio*, do certe ne rilatas la nov-liberalisma penso, kiu laŭ mia kompreno estas simple defendanto de kruda kapitalismo. Mi pensas, ke ni ĉiuj devas akcepti, ke la komunisma totalismo, kiel ĝi vivis en la Orienta Eŭropo, ne plu ekzistas kaj ankaŭ ne plu havas ekzistbezono. La komunismo el Ruslando kaj Ĉinio certe havis sian influon al la kreado de la nuna liberala demokrateca penso en Eŭropo, kaj mi pensas, ke la ido de la iama eŭro-komunismo, kiel ĝi vivas nuntempe en multe pli modernaj formoj de la Neregistaraj Organizoj (NRO), gardas kaj protektas nin, por ke la liberala demokratio ne forglitu al sovaĝa kapitalismo.

La nacioj devis krei akcepteblan motivadon por la asociigo, la federigo de diversaj regionoj kadre de nova ŝtato. Oni devas elpensi ion, kio la popolgrupojn kunligis, popolgrupojn, kiuj antaŭe apenaŭ havis kontakton aŭ ligon, por ke oni povu krei libe-

ran merkaton, la bazon de liberala demokratio.

Permesu, ke mi pro tio konsideras kiun ajn formon de naciismo dekstra kaj reakcia koncepto.

Kiel jam dirite, la totalismo de landoj kiel Ruslando kaj Ĉinio sub gvidado de la stalinisma penso ne plu povas konvinki la progreseman mondon, certe ne post la Ribelo de Hungario kontraŭ Ruslando en 1956, sed certe post la konstato, ke la ekonomio en la komunismaj satelitoj stagnas, (ankaŭ ĉirkaŭ la sama tempo), oni komprenis, ke la komunisma revolucio, ne nur donis malliberecon, sed ankaŭ ne kapablis krei alternativon al la pli efika liberala demokratio. Al tiuj, kiuj nun pensas, ke mi akordiĝis kun la kapitalisma sistemo, mi devas diri, ke kvankam mi ne estas marksisto, nek komunisto, estas forta kontraŭ-kapitalisto. Kiel liberecano mi kredas nur je socio, kie ĉiuj homoj ĝuas plenan liberecon, kia ne ekzistas, laŭ mi, en la ĵus menciitaj sistemoj.

Ege interesa estas la tezo de Wilie Verhoysen, nederlanda liberecano, kiu loĝas en Belgio, ke la nacioj fontis, inter alie, el la malaperado de la komuna latina lingvo.

Li skribis pri tio, ke krom la ruiniĝo de la malnovaj dinastioj kaj la malapero de malnovaj religiaj komunumoj ankaŭ la tielnomata universala lingvo de la mezepoko, la latina, forte perdis sian valoron, kiam en 1800 la moderna historio ekkomenciĝis.

La libropresado estis alia elemento kiu gravis por la nacia idearo.

La latina dum jarcentoj la lingvo de la Eklezio estis, post la ekapero de la libropresado, alie taksata. Per ĝi kreiĝis lingvo, kiu peris ne nur la eklezian dogmaron, sed enhavis ankaŭ interkomunikad-eblojn inter homoj de samaj interesoj, sciencoj, popolarakontojn, literaturon. Fakte, dank' al libropresado kreiĝis grupoj da homoj, kiuj per la lingvo unuiĝis. Tiu fakto eble valoras por ni, esperantanoj kaj ĉu ventuale pro tio diktatoroj dum la pasinteco nepre volis malaperigi nian karan lingvon? La libropresarto rezultigis la aperadon de preslingvo, iu norma lingvo, kunigado de diversaj dialektoj kun la rezulto, ke fine la plej forta dialekto superis ĉiujn aliajn. Tiuj normaj lingvoj aperis post 1800, ĉar ĝuste

ekde tiam kreiĝis per publikigaĵoj, literaturo kaj revuoj, normaj lingvoj.

Naciismo plej verŝajne kuŝas en la idearo priskribita de Platono en la verko *Ŝtato*. La *homa animo*, li skribis, konsistas el 3 partoj: la *sopiranta parto*; la *rezonanta parto* kaj la *parto*, kiun li nomis *Thymos* aŭ la *entuziasmo*. Grandaj partoj de la homa konduto povas esti klarigitaj el kombino de la du unuaj partoj, sopiro kaj rezonado. Sopiro instigas la homon serĉi aferojn ekster si mem, esplori, dum rezonado montras al ili la plej bonan, plej facilan manieron atingi tion. Tamen, homaj estaĵoj serĉas krome, la rekonon de propra valoro, aŭ rekonon de la homoj, aferoj aŭ principoj al kiuj ili povas doni valoron. La inklino aldoni certan valoron aŭ peti valoron al tiu ideo ni nomas nuntempe memestimon. La sento de tiu memestimo fontas el tiu parto de la animo priskribita de Platono kiel *Thymos*. *Thymos* estas iu formo de denaska sento de homa justeco. Homo kredas, ke ili havas certan valoron, kaj kiam aliaj traktas ilin kiel senvalorajn, ili spertas la emocion furiozo. Kiam tamen homoj krome ne povas kontentigi la propran senton pri memestimo, ili sentas honton kaj kiam ili en akordo kun la propra valoro estas pritraktataj, ili sentas fieron. La sopiro al rekonon kaj la kunligitaj emocioj de kolero, honto kaj fiero, estas partoj de la homa personeco, kiu estas decida en la politika vivo. La tuta historia procezo direktiĝis al tiu senco. (Hegel)

Mi reprenas parton el la Platona-diraĵo: *Kiam homoj estas traktataj konforme kun la propra valoro, ili sentas fieron*. Ĉu pro tio la naciismo estas bazita sur propra fiero, ĉu naciismo ne donas al la homoj tiun propran fieron, al kiuj ili sopiras? Plej verŝajne jes, sed la problemo aperos ekde la momento, kiam propra fiero (en la kolektiva penso de nacioj) transiras al maltoleremo, ĉar, la propra fiero, en la kolektiva penso de nacioj, superas la senton de memkontenteco (singlorado?). Nacio estas formo de kolektivo aŭ pli bone dirite, nacio enhavas kolektivajn pensojn, NI la germanoj, francoj, nederlandanoj, belgoj, ni la supera raso, aŭ ĉu ni nun preferu parolas pri la sociintegra funkcio de la naciismo, kiu kreas la trompan ŝajnon de intereskomuneco de ĉiuj nacioj, ĉu burĝoj, ĉu proletoj. En nia kolektiva penso ni postulas rajtojn, sed

facile forgesas devojn. Kiel mi je la komenco diris, la nacio fontis el la Franca revolucio, la revolucio de libereco, egaleco kaj frateco, sed diru al mi, diable, kie mi povas, en nacioj retrovi liberecon, aŭ ĉu vi konsideras submetiĝon al la kolektiva penso, formo de libereco? Obeado al deviga kolektivismo estas for de iu ajn formo de libereco. Ankaŭ egaleco estas io, kion mi, eĉ farante multe da peno, ne retrovas en nacio, ĉar en nacioj, nur tiuj egalas kiuj apartenas al la nacio, kaj eĉ pri tio ekzistas dubo. Frateco, nun tiu vorto iĝas ridinda, kiam kiel nun, la naciaj ŝtatoj fermas la limojn al eksterlandaj gastoj, al niaj fratoj, kiuj kiel individuoj rajtas klopodi plialtigi sian vivnivelon. Sed kion ni nacianoj postulas de niaj eksterlandaj fratoj? Ni postulas de ili nur devojn, kaj eĉ la rajton protesti kontraŭ sian mizeran sorton, ni klopodas malpermesi. Ni, la kolektivo, la nacio parolas pri kontraŭileĝuloj, kiuj enpenetras nian naskiĝlandon, nian teron. Kvankam laŭ mia scio la tero devus aparteni al ĉiuj.

Antaŭ 2 jaroj mi komparis ĉi tie, en la sama loko la ideojn pri homaj rajtoj, kaj la teksto poste aperis en *Sennaciulo*, la revuo de la Sennacieca Asocio Tutmonda kaj estis interalie pridiskutata en *Laŭte*, la liberresprimgazeto de Kribo. Fine, la diskuto terure akriĝis, kiam mi esprimis mian malfidon al la «Universala deklaro pri homaj rajtoj», kiu laŭ mi estas simple teksto de politikistoj, teksto, kiun honestaj homoj ne bezonas, kiuj el si mem respektas alies rajtojn, sed kiun ni bezonas por atentigi ŝtatojn kaj naciojn pri ilia malrespekto al la rajtoj de individuoj aŭ grupoj.

Nacioj altrudas al la homoj, kiuj loĝas en tiu kolektivo, regulojn kaj devojn, kiuj forte limigas la homajn rajtojn. Oni povas esti parto de la nacia kolektivo, nur kiam oni parolas la lingvon de la kolektivo. Do se vi sentas vin kosmopolito kaj vi volas uzi ekzemple la interkomunikilon Esperanton, tio ne eblas, ĉar vi devas obei la lingvan regularon de la kolektivo. Enmigrantoj devas adaptiĝi al la moroj kaj kutimoj kaj kompreneble la lingvo de la nacio por esti akceptataj. Mi povas interpreti tion nur kiel maltoleremon, kiel senton de supereco super aliaj homoj de malsama klano, grupo aŭ nacio.

Naciismo ne kaŝas la malkonsenton inter nacio kaj dinastika regno, ĉu la Franca Revolucio rezultigis, ke la popola naciismo ŝanĝiĝis al la nuna naciismo de la ŝtato? En sia verko «Sendankeco» Alain Finkelkraut, priskribis ke la nobelaro, kiu post la Franca revolucio troviĝis en danĝero, kreis el la popola identeco iun novan, la ŝtat-naciismon, la nunan reĝlandan naciismon, tiel zorgante ke por ili daŭre restu loko.

Mi jam klopodas vendi al vi la fakton, ke naciismo estas reakcia ideo, pro la fakto, ke en nacioj ne ekzistas individua libereco, eĉ kiam ni parolas pri la naciismo, kiu protektas la lokan lingvon, morojn kaj kutimojn, ĉar tio estas por mi la jam menciita popola identeco. Por mi naciismo estas patrino, kiu kun la infano sur la brako enpuŝatas la gaskameron. *Ĉe ni ĉio estas pli bona* oni iam diris, kaj *propran popolon antaŭ ĉiuj*, estas la nuna slogano. Flagoj, standardoj kaj simboloj estas kiel dioj benataj: oni surgenuiĝas kaj klinas la kapon antaŭ la naciaj simboloj kaj sia gvidantaro.

Afero, kiu ankaŭ restas ege nebula por mi estas: ekde kiam oni apartenas al La Nacio? Ĉu post unu generacio? Certe ne, ĉar la dua generacio de turkoj kaj marokanoj, eĉ havante identeckarton de nia nacio, daŭre restas en la okulo de naciisto fremduloj. Do eĉ se vi klopodas submeti vin al la devoj de la nacia kolektivo, tio ne signifas, ke vi iĝos akceptata. Eble kelkaj inter vi nun pensas, ja nordafrikanoj kaj turkoj, sed ili havas la malĝustan koloron. Sciu, ke mi persone konas viron, kiu apartenas al la 3a generacio de nederlandanoj, kiu loĝas en Belgio, kaj kiam li ekzemple post futbalmaĉo dum la ludo por la mondopokalo diris: ni gajnis, celante la belgan nacian teamon, ĉiuj tuj diris: sed la nederlandanoj ne ludis hieraŭ. Kvankam tiu persono flue parolas la lokan dialekton kaj krom la praavo havas nenian lignon kun Nederlando, ĉiuj daŭre konsideras lin nederlandano. Naciismo ne havas lokon por novaj nacianoj.

Inverse mi spertis alie. Amiko, judo, parolis kun mi pri la problemoj de ekstremnaciismo, pri grupo, kiu dum elektoj atingas bonan duan lokon. *Kion vi faros*, mi demandis, *kiam la naciistoj estos la plej potenca partio*. Ho, li respondis, *mi iros al mia patrio, al Israelio!*

Sed, mi reagis, laŭ mia scio vi neniam estis en Israelio, kial vi povas paroli pri «mia patrio» parolante pri lando, kiun vi eĉ neniam vizititis? Israelio estas la patrio de ĉiuj judoj por ĝi mi volas morti, estis la reago de mia amiko, kiun mi ĝis tiam konsideris normala.

Por ĝi mi volas morti, li diris. Imagu, karaj amikoj, morti por eltrovaĵo de la potenco, de la reganta klaso, kiu bezonas nian sangon por ke ili ne perdu la potencon.

Kiel dirite je la komenco, mi ne volis konsulti la lantian verkon **Naciismo**, ĉar mi pensis, ke inter 1930, la tempo kiam li verkis la studon, kaj nun, okazis grandan ŝanĝon en la penso de la homoj. La komunisma Ruslando malaperis kaj la marksisma teorio akceptiĝis en pli nova formo en la liberala demokratio kiel sociala apogilo de la liberala penso, sed bedaŭrinde la homoj daŭre limigas la kunvivantojn per limoj de klasoj, triboj, grupoj, kaj nacioj, al kiu vi nur rajtas aparteni, kiam vi rekonformas kun certajn kutimojn kaj regulojn.

En la studo de Lanti mi legis: *kelkaj aŭtoroj multe penadis por montri la ekziston de nuancoj inter la vortoj patrio, nacio, lando, ŝtato. Ni ne perdos tempon por vidigi la vanon de tiaj subtilaĵoj. Praktike tiuj terminoj rilatas al la sama objekto kaj estas samsignifaj.* Nun mi timas, ke Lanti pravas, ĉar **nacio, lando, patrio** kaj **ŝtato** estas konstruo, al kiu vi rajtas kaj devas aparteni sen mem povi decidi ĉu vi ja aŭ ne volas tion. Belgio estas mia nacio, ŝtato, lando kaj patrio kaj oficiale mi apenaŭ povas nei tion. Kvankam mi ne havas intereson pri Flandrio, aŭ Belgio, mi devas kunporti identeckarton por ke la ĝendarmoj ne povu puni min, mi devas povi pruvi mian naciecon, ŝtatancon. Mi jam konstatis, ke kiam mi diras ke mi estas liberecano, ke homoj iom komplete ridas, sed dirante, ke mi sentas min sennaciano vere povas furiozigi pli multe da personoj ol vi povas imagi. Kiam mi eklernis Esperanton, mi kredis eniri mondon de senlimeco, sennacieco, kosmopolita libereco. Bedaŭrinde mi rapide koliziis kun la sama maltoleremo kiel en la medio de la denaska lingvo.

Karl Marx iam diris: *la nacio povas efektiviĝi nur, kiam ĝi forigas sin mem!* Por konfirmigi la ideojn de 1789, la franca revolucio, la ideo devas malaperi en universala repaĉigo..., kaj

li daŭrigas: *kiu havas intereson je landlimoj? La reĝoj! Dividu kaj reĝu. Landlimo signifas gardo-postenon, posteno signifas soldaton. Enirado malpermesata, la signalvorto de ĉiuj formoj de privilegioj, malpermesoj, cenzuro kaj tiranio. El tiu limo, el tiu gardo-posteno, el tiu soldato venas, por la homaro, ĉiun malprosperon.*

Naciismo ne mortis post kruelan militon, sed male kreskis, kaj laŭ Alain Finkielkraut, eble la plej grava filozofo en Francio nuntempe, unu el la kazoj de tio estas la postulo, ke oni devas rememori. La ideo, ke rememoro devas estis konservita, estis laŭ Finkielkraut relative nova. Remeroro, li diras, estas altrudita al la postmilita generacio, kiu fakte nenion rememoras. Remeroro, estas la rifuzo atribui la de la nazioj faritajn genocidojn nur al la objektiveco de la historio. La celo estas; resti samtempulo de okazaĵo, kiun oni mem ne spertis. Oni komencis paroli pri la devo ne forgesi, por signi unufanke, ke la specialistoj de la historio ne devas malsarĝi la homojn sed male doni al ili la vivantan konon/sperton, kaj montri ke malintereso, distanco kaj etika neŭtraleco estas ne akcepteblaj. Ne eblas alpreni iun sentan distancon koncerne Auschwitz kaj laŭlitere sekvi la preskribon de Spinoza: La homajn farojn, ne ridindigu, nek bedaŭru, nek prijuĝu, sed komprenu.

Ĉu tiu diro de Spinoza rilatas ankaŭ al la stulteco nomata **nacio**? Mi ne scias.

Ĉu ni povas forgesi kiom da mizero alportis naciismon, kiam ni rerigardas al la historio de niaj nacioj? Ĉu ne estis en la nomo de dio, reĝo kaj regantoj, ke ni instaligis en la kolonioj. Dum jaroj, ŝtelante diversmaniere la plej fruktedonajn grundojn, laboriginte la indiĝenojn kontraŭ mizeraj salaroj, ĉu ni ne eĉ soldatiĝis virojn, plej ofte kontraŭvole, por batali nian militon?

Kian dankon nia nacio donas, kiam ni pensas pri la nordafrikanoj, kiujn oni igis fari la plej danĝerajn, penigajn, malpurajn laborojn, kiujn siatepe la nacie fiera popolo rifuzis fari, kontraŭ ege malaltaj salaroj.

Mi verkis mian parolon dum mia feriado en Hispanio, kaj la brila suno de Katalunio ne povis alporti pozitivajn pensojn pri naciismo. Komprenble mi loĝas en Antverpeno, urbo kie pli ol 33% el la balotulbrutaro voĉdonis por

Vlaams Blok, por ekstremnaciismon. Mi scias, ke kiam mi veturas sur la aŭtovojo venante tra Francio al la tunelo sub la Schelde, la rivero, kiu estas la natura limo inter la antverpena kaj la flandra dialektoj, ke mi sentas min bone. Hejmen, mi revenas hejmen al la domo, kie mi loĝas, al la urbaj filozofoj kaj la stratidiotoj, la stranguloj kaj pseŭdointelektuloj kaj mi kontente traveturas la tunelon al mia urbo Antverpeno, kie mi tiel kontente povas vivi. Sed mi ĵuras, karaj amikoj, se morgaŭ iu ajn volas starigi maltoleremon aŭ naciisman mallarĝecon, mi per la sama rapideco kiel mi venis al la urbo ankaŭ elektos la vojon al alia pli tolerema loko.

Neniu lando, ie ajn en la mondo, apartenante al iu ajn politika sistemo, modernigis la socion kun fermitaj pordoj, diris en 1982 Deng Xiaoping. Naciismo estis fermita pordo por mi.

Ĉu eble internaciismo donas plian kontentigon al ni ?

Victor Hugo iam skribis en sia verko **Politiko: Distancoj limigiĝos, la trafiko rapidiĝos kaj la homaro pro tio iĝos solidara unueco**: ĉiuj grandiozaj faktoj de nia tempo alportas pacon. Preso, vaporenergio, elektro, telegrafio, unueco de mezurunuoj, libera merkato estas nenio pli ol la labordonaj elementoj de la ingrediento Nacio en la granda miksaĵo pro kio la homaro solviĝas. Ĉiuj fervojoj kiuj laŭŝajne direktas sin al malsamaj direktoj, Sankta Peterburgo, Madrido, Napolo, Berlino, Vieno, Londono, iros al la sama loko: LA PACO. La tagon kiam la unua aeroŝipo leviĝos, malaperos la lasta tiranio sub la grundon.

La Franca Revolucio volis tion; la teknika progreso efektiviĝis ĝin. Al Parizo —*la urbo de kiu ĉiu estas civitano*— apartenas laŭ nature la rajto esti la ĉefurbo de la kosmopolita mondo kaj al Francio la rajto estiĝi la mesaĝisto de la unueco: «Kia brila, korvarmiga kaj grandega fenomeno estas tiu vaporiĝo de iu popolo al fratecol Ho, Francio, adiaŭ! Vi estas tro granda por esti simpla patrolando. Ni adiaŭas nian patron, kiu iĝis dio. Nur momenton, kaj vi transfigure forflugos. Vi estas tiel granda, ke vi eĉ ne plu estos. Vi ne plu estos Francio, vi estu la homeco, vi ne plu estos nacio, vi estu ĉieesta. Vi estas antaŭdestinita forvaporiĝi kiel

brilanta unueco, kaj dum ĉi tiu horo nenio estas tiel grandioza kiel la videbla forviŝado de viaj limoj. Estu bazita je via grandega amplekso. Adiaŭ popolo! Bonvenon homo!»

Jam delonge la unua aerŝipo flugis kaj informacio transiras nian mondon pere de interreto. Telefono kaj fakso iĝis la tamtamo de la nova jarcento. Kiam ni legas informon pri la tuj-estontaj iloj por interkomuniki, ni apenaŭ povas kredi, ke iuj kuraĝas defendi la etburĝecon de la nacia penso. La mondo estas nia. Diris Finkielkraut en la verko **Maldankeco**: *Venas nova vivospaco, kiu ne plu ekzistas el objektoj, sed el malobjektoj — tio signifas el bildoj kaj programoj, kiuj ne plu obeas al limoj kaj teritorioj. La informacio-prizorgantoj, kiuj kune konsistigas la novan aristokration, la kreantoj, esploristoj, juristoj, bankistoj, konsultantoj, arkitektoj, filmoproduktistoj kaj artaj — direktoroj, eldonistoj, verkistoj kaj ĵurnalistoj, ĉiuj partoprenantoj de la Hightech— ludo, asertas esti aŭ deziras esti mond-civitanoj. La kosmopolitismo vere estas ilia praktika filozofio: por atingi dimension de modeco ili eĉ, sen multe da intelekta kaj morala penoj, povas malligi sin el la propra malgranda mondeto. Ligita al ĉiuj informofontoj kaj retoj ili staras kun ambaŭ kruroj en la universaleco.*

Naciismo estas al tiu elito de la *Global Village* same fremda kiel la kosmopolitismo estis por la iama vilaĝano. Sed la vilaĝo, eĉ nomata tergloba vilaĝo, restas vilaĝo kaj do la rifuĝejo de la fermita animo.

La demando kompreneble estas; ĉu tiuj mond-civitanoj, tiuj kosmopolitoj volas dividi la riĉecon kun la povruloj aŭ la malplej favorataj samspeculoj aŭ ĉi ili preferas retiriĝi en la memkreitajn getojn, kie troviĝas la privata lernejo, fitnescentroj, privataj policistoj eĉ privataj rubaĵ-kolektantoj?

Kaj ni, karaj geamikoj, kiel internaciaj ni estas ? Kion ni celas ? En **Sennaciulo** de julio troviĝis leteron de k-do kiu volis diskuti pri klasbatalo kun aliaj gekamaradoj, sed ne ricevis respondon. Ĉu tio signifas, ke a) klasbatalo ne plu ekzistas aŭ b) ke neniu havas intereson pri internacia batalo, kiu fakte la internacian penson devas enhavi ?

Fakto estas jeno: kiam klasbatalo iam ekzistis, kaj ĝi ne okazis internaciskale, ĝi entute ne efikis. Dum la jaroj mi ne plu kredas

je la internacia klasbatalo, kiu estas la bazo de internaciismo, ĉar internaciismo povas nur regi kiam ekzistas supernacia pensado. Pensado inter la nacioj ja ankaŭ signifas, ke ni daŭre defendas la nacian apartecon de diversaj grupoj. Imagu, ke ni devas agadi internacie. Mi prenas simplan ekzemplon pri kiu suferis iam Nederlando kaj poste Belgio. La diamantprilaborado. En 1949, la tiama ministro pri laboro, la gravega socialisto Camille Huysmans permesis, ke la entrepenoj, kiuj prilaboras kaj vendis/aĉetis diamantojn, rajtu dum aĉetado kaj vendado forstreki 25% de la impostenda sumo. Jes, ankaŭ la salajro pagita al la diamantŝlifistoj rajtas esti traktata kun la samaj 25% da rabato, rilate al la oficiala salajro. La sindikatoj, kiuj estis socialisme konstruitaj, aplaudis la decidon de la ministro, sed ili forgesis, ke la konkurencaj laboristoj en Amsterdamo pro tio perdis laboron. La entreprenistoj en Amsterdamo postulis la samajn rajtojn kiel la kolegoj en Antverpeno, sed la laboristoj en Amsterdamo ne akceptis la proponon, kaj komenciiĝis striko kontraŭ la estroj kaj la eventuala decido favore al malplialtigo de la oficiala salajro. Multaj laboristoj en Amsterdamo perdis laboron pro la decido de belgaj socialistoj. La sindikato, kiu ŝatas paroli pri internacia solidareco, nun parolis pri protekto de la propra merkato. Mi simple volas diri, ke en internaciaj rilatoj daŭre la nacia sento ludas la plej gravan rolon. Internaciaj, do rilatoj inter la nacioj solvas same malmulton ol nacioj. Dum la jaroj la entreprenistoj en la mondo de diamantoj ne plu kontentis kun la po 25% da seninposta komerco kaj ili trovis aliajn malpli kostajn landojn ol Belgio por ŝlifi la diamantojn. Ĉu vi pensas, karaj amikoj, ke la laboristoj el Ĉinio, Ruslando kaj Hindio komencis krii: *Ho, ni ne volas forrabi la laboron de niaj k-doj el Belgio, ne ni ne volas ŝlifi tiujn diamantojn.* Kompreneble ne, ili sidigis sin sur la seĝon kaj eklaboris kontraŭ dekonono de la salajro, kiun ni ricevis.

Alia problemo. Kiam ni simple travagas Eŭropon, ni konstatas, ke pli kaj pli da regionoj postulas memregadon. Mi nun ne scias, ĉu la frisoj jam ĵetis bombon al la kaleŝo de la reĝino en Nederlando aŭ faris atencion kontraŭ politikistoj. Mi scias ke en Eŭskio (Vaskio) jam okazis multaj atencoj, mi scias

ke en Francio ekzistas grupoj, kiuj postulas liberigon disde la Franca Ŝtato, ni ĉiuj ekscias pri la problemoj en iama Jugoslavio, dispartigo de ĉeĥio kaj Slovakio kaj certe vi mem konas aliajn ekzemplojn.

Do tiu mondo, kiu volas internaciigi, unue postulas federigon.

Mi ne feris, laŭ subskriboj sur muroj, en Hispanio, sed en la libera Katalunio. La katalunoj volas uzi la propran lingvon, propran konstitucion. Feliĉe ili estas iom pli mildaj en la batalo ol la eŭskoj, kiuj ne timas uzi armilojn por subteni la postulojn. Almenaŭ ne ETA. Kelkaj partioj en Belgio, en la federacio Flandrio postulas sendependecon disde la valonoj, kaj ne kredu, ke mi nun simple parolas pri la ekstremdekstra Vlaams Blok.

Homoj kiuj lernis Esperanton kaj kiujn oni povus konsideri mondcivitanoj, restas sur la nivelo de internaciistoj. Multaj estas eĉ aktivaj etnistoj - kaj ilia internaciismo estas tia, kia konformas kun la etna partikularismo. Do rilato inter nacioj, jes, sed antaŭ ĉio restas la propra nacio, la propra popolo, kiu estas tiel multe pli elstara ol la aliaj. Kompreneble ne ĉiuj sin sentas mondcivitanoj kaj kiel mia amiko Gary Mickle prave rimarkigis, ŝovinismo en tiu kruda formo tamen ne estas, aŭ apenaŭ estas renkontebla ĉe esperantistoj.

Kaj asocioj (Neregistritaj Organizoj) kiel Amnistio Internacia kaj Greenpeace aŭ Kuracistoj sen limoj, ĉu ili estas sensignifaj? Certe ne, karaj amikoj. Sed ili ne rilatas inter nacioj laŭ politika senco, sed laŭ humanisma maniero. Amnestio Internacia klopodas efektiviĝi mondvaste la Universalan Deklaracion pri Homaj Rajtoj, alie dirite, oni pritraktas la homajn rajtojn internaciskale laŭ la sama maniero. La Universalan Deklaracion pri Homaj Rajtoj subskribis preskaŭ ĉiuj landoj, entute estis nur 8 sindetenoj, kiam la 10an de decembro 1948 estis akceptita la deklaracio en la sino de Unuiĝintaj Nacioj. Sed por tiuj samaj nacioj, plejparte, la Universala Deklaracio havas la saman valoron kiel la papero, sur kiu oni skribis ĝin. Kompreneble ne estas malbone, ke ekzistas Amnestio Internacia, kiu laŭ mia kompreno rolas kiel sociala konscienco de la internacia politika pejzaĝo. Greenpeace devas eviti, ke la internacia komerca potenco tro

rapide aŭ entute forkonsumas la naturon. Sen Greenpeace eble multaj homoj eĉ ne sciuz, ke ekzistas praarbaro.

Ĉu vi memoras, kiu kulpis pri la mortpuno, kiun suferis naturprotektantoj en Niĝerio? Ĉu mi bone memoras, ke estis kontata reĝa oleofirmao kiu detruis grandan parton de la fekunda grundo en Niĝerio? Feliĉe, ekzistas nun la kontrolo de la Neregistaraj Organizoj, ĉar alie ni eble neniam sciuz, kio okazis rilate al malrespekto al homo kaj naturo.

Ĉu vi jam vidis la detruadon de la naturo, kiun kaŭzas ŝerĉado de diamantoj? Diamantoj, kies sola valoro estas ornamo riĉulojn.

La nura kaj vera internacia laboro, kiun mi spertas, estas la laboro de tiuj Neregistaraj Organizoj.

Mi pensas, ke Amnestio ne pli volas protekti la vivon de blankulo ol la vivo de nigrulo aŭ indiano aŭ flavulo. La naturo en la Alta Veluwe ricevas la saman protekton kiel la arboj en la Nigra Arbaro, aŭ la vivo de lupoj en la montaro de Hispanio egalas al la vivo de baleno ie ajn en la mondo, por Greenpeace. La vunditoj de internaciaj militoj ricevas ĉiuj la samajn zorgojn sen konsidero pri deveno aŭ etno, kiam la Kuracistoj sen limoj laboras.

Sed fine la Neregistritaj Organizoj ankaŭ laboras laŭ nacia koncepto. Amnestio Flandrio, Greenpeace Nederlando ktp. Jes eĉ tie restas malgraŭ la internacia strukturo la ombro de nacieco.

Eble la tria eblo solvas ĉiujn niajn problemojn. Ni ĉiuj aliĝos al Sennacieca Asocio Tutmonda kaj aniĝos al la Sennaciista Frakcio, sed kiel ĉiuj inter vi sciaz, la Sennaciisma Frakcio ne vere viglas en SAT kaj ekzistas - nur kelkaj pri sennaciismo interesitaj SAT-membroj, kiuj eble iam reestablos ion similan.

Mi certe ne devas klarigi al vi la diferencon inter sennacia asocio kaj sennaciista frakcio - mi esperas - sed por tiuj kiuj havas problemojn kun la terminoj mi volonte estos je via dispono post la parolo.

La sennaciisto prezentas al si la teron kiel tuĉon, apartenantan al ĉiuj teranoj.

Diris Lanti:

La sennaciistoj maltime kaj malkaŝe denuncas tian gvidistan parazitemon. Ili sin turnas al la amaso kaj vokas al la racio de l'

komprenkapablaj homoj, por ke ĉi tiuj lastaj utiligu kaj disvastigu ĉion, kio estas racia; ĉion, kio prezentas teknikan progreson kaj helpas detruo la barojn, kiuj ĝenas la antaŭeniradon de l' proletaro. La sennaciistoj batalas kontraŭ ĉio nacieca: kontraŭ naciaj lingvoj kaj kulturoj, naciaj kutimoj kaj tradicioj. Por ili Esperanto estas sia ĉefa lingvo kaj la naciajn lingvojn ili rigardas nur kiel helpajn. Ili rifuzas partopreni en iu ajn nacibatalo kaj agnoskas kiel necesan kaj profitdonan al la ekspluatataro nur la klasbatalon kun la celo forigi la klasojn kaj la naciecojn kaj ĉian ekspluaton. Ili subtenas ĉion, kio helpas malaperigi la diferencojn inter la popoloj kaj kondukas al racia mastrumado de l' terĝlobo. Ili opinias, ke ĉio, kio miksas kaj lutas la popolojn, faras bonan homaĵon.

Montriĝas el la teksto, ke Eŭgene Lanti ne estis Zamenhof, ambaŭ personoj havis klare tute aliajn esprimmanieron kaj emociion. Estas klare, ke Lanti, kiu verkis la tekston en 1931 emocie estis pli ligita al la laborista afero ol Zamenhof kaj por mi la teksto esprimas la dezirojn de honesta persono, kiu same kiel Zamenhof celis al paca mondo.

La membroj de SAT ĉi tie sciaz, ke regule ekestas debato en la sino de SAT pri la famaj vortoj de Lanti. Kun granda miro mi legis antaŭ nelonge tekston de Gilbert Ledon, per kiu li terure fifamigis la lantian ideon.

*Antaŭ multaj jardekoj, kiam mi legis **Manifesto de la Sennaciistoj-n de Lanti**, skribis Ledon, mi konsciis ke tiu manifesto estas preskaŭ same nazia kiel la **Mia lukto de Hitlero...**, aŭ ĉu eblas imagi iun politikan reĝimon kiu, batalas kontraŭ ĉio nacieca - kontraŭ naciaj lingvoj, kulturoj, kutimoj kaj tradicioj-. Jen skemo por terora, tutmonda ŝtato de obskurantismo, ĉar la homo estas plureca kaj devas vivi libere.*

La posta **Sennaciulo** aperigis reagon de mia amiko Gary Mickle, kiu plej verŝajne donis ne nur respondon al la insultoj de Ledon al Lanti, sed bone altiras la sennaciisma penso al la nuna tempo, al pli moderna koncepto.

*Mi ne konsentas kun absolute ĉio en la **Manifesto de Lanti**, diris Gary. Lanti forte rekomendas la individunivelan sennaciigon. Varbi homojn por observado de sennaciisma kultura "normo" laŭ mi iom tro similas al la*

konduo de iuj naciistoj, resp. etnistoj, kiuj starigas "normojn" de patriotismo, nacia sento, etna identeco. Alivorte, Lanti volas oponi kontraŭ la batalema kontraŭkosmopolitismo per novtipa, ankaŭ batalema kosmopolitismo. Neniel elĉerpe li traktas la amplekson kaj naturon de la kulturaj perdoj, kiujn laŭcela sennaciigo de la mondo supozeble akcelus. Li pledas krome por sia propra vizio de estonta tutmonda mastrumado, laŭ mi tro spekulativa por esti integra parto de utila politika manifesto.

Tamen, nenio en la **Manifesto** meritas la brulstampo de faŝismeco, kiun k-do Ledon volas meti sur ĝin. La patosa tono de Lanti memorigas pri la alia, multe pli fama Manifesto de Marx kaj Engels, kaj ĝi povas ne plaĉi al iu aŭ alia. Sed li ne pledas por ia sennaciisma "reĝimo", kiel k-do Ledon kredigas per citaĵo ("... batalas kontraŭ ĉio nacieca . . ."). La citaĵo en sia efektiva kunteksto koncernas la sennaciistojn kaj ne iun ŝtatan sistemon. Krom tio, Lanti eksplicite favoras la kulturalan diversecon, kvankam tio sendube ŝajnas stranga kaj memkontraŭdira al tiuj, kiuj egaligas la nociojn "kulturo" kaj "etna kulturo".

Mi mem pensas, ke Lanti sentis sin mem sennaciisto, homo, kiu ne bezonas la subtenon de iu nacia ŝtato: ĉu eble li eĉ ne havis la hejmeccan senton, la ligan al la strato kaj loko, kie li dum jaroj vivis?

Ke lia ideo estis honesta montriĝas la sekva frazo el la **Manifesto de la Sennaciisto**: *Tio ne signifas ke la homoj fariĝos ĉiuj sammodelaj. Kreiĝos certe ia unueco en la spirito-stato kaj karaktero de la homoj. Fariĝos la naciaj apartaĵoj, sed daŭre ekzistos individuaj diferencoj. Kaj tial ke la homoj havos la eblon kontakti kun ĉiuj mondpartoj, havos plurajn horojn liberajn ĉiutage kaj povos ilin dediĉi al persona laboro; al individua kulturo, oni prave konjektas, ke el tio rezultos fortaj individuoj kun originalaj pensoj kaj sentoj, kiuj esprimiĝos en diversaj artoj, kompreneblaj kaj senteblaj en la tuta mondo.*

Nur zelota naciisto povas protesti tiun frazon, sed konsiderante, ke la teksto verkiĝis en 1931, do antaŭ 70 jaroj, ĝi ne perdas valoron kaj restas moderna por esti pritraktata eĉ nun.

Mi volis komenci mian parolon per diroj de Zamenhof, sed fine decidis uzi la frazon ĝis la fino. Eble Zamenhof, la okulkuracisto el Bjalistoko estas multe tro subtaksita, kiam temas pri homaj kondutoj aŭ humanisma penso ĝenerale; ĉu ne estis li, kiu skribis al la Hebrea Ligo: *Mi estas profunde konvinkita, ke ĉiu nacionalismo prezentas por la homaro nur plej grandan malfeliĉon, kaj ke la celado de ĉiuj homoj devus esti: krei harmonian homaron.*

Mi scias ke ĉiu el vi subtenas ĉi tiun ideon de Zamenhof, krei harmonian homaron. Sed laŭ kiu koncepto? La politika dispartigo de homoj laŭ nacio ne povas kontentigi progresemulojn pro la tro maltolerema ideo, kiu troviĝas en la nacia penso. Internaciismo havas la samajn grandajn malfortajn flankojn kiel naciismo, ĝi ankaŭ baziĝas sur la NI-ideo, ni kontraŭ la ceteraj. Eble la lantia ideo de sennaciismo estas el la tri alternativoj la plej bona. Plej verŝajne Lanti influĝis de la pensoj de sia bona amiko, la anarki-individuista filozofo Henri Ner. Dum la tempo, kiam mi preparis ĉi tiun babiladon, mi legis kelkajn tekstojn de Maks Stirner, individuisto kaj liberecano plej versajne la patro de la individuista penso. Memorante tiam ke mi ankaŭ havas iun en tiu senco esperantlingve mi retrovis la **Individuista Manlibreto**-n de Han Riner kaj tiu Han Riner estas ja nia amiko de Lanti, Henri Ner.

Henri Ner skribis responde al la frazo *Kion vi komprenas per la nomo individuismo? Per individuismo mi nomas la moralan doktrinon, kiu sin apogante sur neniu dogmo, sur neniu tradicio, sur neniu ekstera volo, alvokas nur al la individua konscienco.*

Karaj amikoj, mia espero estis, ke mi povu prezenti al vi la veron por la 21a jarcento. Bedaŭrinde eĉ sur la sojlo de ĉi tiu jarcento, mi ne havas respondon por vi. Mi ja faris al mi grandajn zorgojn, kiam mi konstatas, ke tutmonde la homoj akriĝas la nacian pensadon, aŭ reiros al la popola identeco de antaŭ la franca revolucio. Ni la plej bonaj. Kvankam ni posedas ilojn, kiuj povas zorgi, por ke morgaŭ ni estu je la alia flanko de la mondo, sur la plej alta pinto aŭ en la profundeco de la oceanoj. Dum epoko, en kiu limoj ne plu ekzistas por kapitalaj transakcioj, senlimaj negocoj, ni rigardas televidon aŭ tajpas

interretan mesaĝon, la plej ofta novaĝo bedaŭrinde rilatas al interhomaj buĉadoj. Por defendi la nacion, la tribon, homoj daŭre mortbatas unu la alian. Por la dio aŭ lingvo, kiun ni preferas, ni ne hezitas ĵeti bombon al la domo de la najbaro. Ni postulas kaj postulas kaj forgasas niajn devojn, la devon, ke ni vole-nevole devas akcepti, ke nia vero estas nur nia vero - nenio pli - kaj ke aliaj rajtas sian propran veron. Limigi la liberecon de aliaj estas por mi la plej grava puno, kiun homoj povas doni, kaj tio rilatas ne nur al la elekto de via loĝloko. Libereco estas la plej grava posedaĵo de la homo. Por esti liberaj ni kompreneble devas plenumi niajn devojn kiel homo kaj respekti la liberecon de la aliaj homoj.

Evidentas, ke homoj vivas en socioj, de kiuj ili dependas. Ne nur por siaj specifaj ambicioj kaj celoj, sed ankaŭ por la lingvo, en kiu ili esprimas la ambiciojn kaj celojn. Pro tio ekzistas daŭra kaj neeskapebla fonto de konfliktoj. Homo dependiĝas unu de alia, sed devas esti liberaj. Libereco signifas konfliktojn, kaj vivi en socio signifas, ke ni devas trovi solvon por tiuj konfliktoj, pere de intertraktadoj, kompromisoj aŭ demokrataj decidoj.

Thomas Hobbes jam skribis siatempe: *En la homa naturo ni trovas tri ĉefkaŭzojn de malkonkordo. Unue, la konkurado; due, la malfido kaj trie, fiero. (...) kaj en la tria, iu aŭ oni uzas perforton, nur pro bagateloj, kiel vorto, rideto, difereco de opinio, kaj ĉiuj signoj de malestimo, ĉu direktita kontraŭ via persono, aŭ nerekte, kontraŭ viaj parencoj, amikoj, lando aŭ nomo.*

Laŭ Hobbes homoj batalas por necesaĵoj, sed eĉ pli por etaĵoj kiel rekono.

Nur homoj sopiras al objektoj, kiuj el biologia vidpunkto estas tute senvaloraj, kiel medalo aŭ la flago de la malamiko.

Ni volas havi socion, kiu ne suferas malhavon, kiu kapablas bone vivi. Ni volas ke la labormerkato efike funkcii, sed tiam ni devas akcepti en la socio, en kiu ni nun vivas, ke laboro iĝos pli kaj pli moviĝema/movebla: laboristoj ne plu ligiĝos al la specifaj taskoj, lokoj aŭ sociaj ligoj, sed devas preni kaj ricevi la liberecon al ŝanĝo, por eklerni novajn taskojn kaj teknologiojn kun la celo povi vendi sian laborforton al tiu kiu pagas la plej altan

prezon. La rezulto kompreneble estos forta subfosado de la tradiciaj sociaj grupoj, kiel triboj, klanoj, familioj ktp. Ĉi tiuj grupoj povas doni laŭ certaj vidpunktoj grandan kontentigon al la vivo, sed pro la fakto, ke ili ne estas organizitaj laŭ raciaj principoj de ekonomika efikeco, ili perdas la batalon kontraŭ grupoj, kiuj jes respektas tiujn raciajn principojn. Ni vivas en socio, kie la libera merkato regas la tutan mondon kaj ĉu en ĉi tiu mondo ni ne devas akcepti, ke nia najbaro estas alilandano, homo, kiu serĉas aliajn eblojn (provokoj?) Mi legis antaŭ nelonge, ke se la Eŭropa Unio volas daŭre pagi emeretiĝmonon al siaj maljunuloj, ni antaŭ la jaro 2015 devas trovi dekvin milionojn da enmigrantoj, kiuj volas laboron, por ke ni havu nian pagon. Ni devas akcepti, ke nia nacio iĝas multkolora, multnacia, ke ekzistas pli ol unu dio kaj kredo.

Mi pensas ke la venonta jarcento ne plu havas lokon por postuli, ke via eksterlanda najbaro adaptiĝos al niaj normoj kaj kutimoj. Ni devas trovi novajn interkonsentojn, novajn manierojn por rilati kun niaj kunteruloj. Certe ni devas trovi novan manieron por krei sociojn kaj grupojn. En moderna socio ne plu estas loko por la jam tro maljuna nacio, kio signifas, ke ankaŭ la inter- nacio malaperos. La koncepto de Lanti pri Sennaciismo povas rami nur parte, sed eble post saĝa diskuto ni provas elkribri el ĝi la plej taŭgajn elementojn, kiuj donas al ni la eblon krei senlandliman sistemon, en kiu ĉiuj povos kontentige vivi.

Mi legis kaj relegis la verkon de Francis Fukuyama *La fino de la historio kaj la lasta homo*, ĉefverkon en la tuta mondo laŭdatan. Se ni kredis Fukuyaman, neniam plu venos nova sistemo, kiu superos la liberalan demokration. Kiu estas mi por kontraŭdiri tion, sed se li pravas, ni nepre devas plifortigi kaj subteni la neregistritajn organizojn, kiuj restas la nura demokrata opozicio al tiu sistemo. Ni devas kontraŭbatali pere de tiuj NRO la krudan kapitalismon kaj direkti la liberan merkaton al humana normo.

Kion ni bezonas? Por mi restas nur la vortoj de Henri Ner, la amiko de Lanti; Ke ni devas apliki la moralan doktrinon, kiu, sin apogante sur neniu dogmo, sur neniu tradicio, sur neniu ekstera volo, alvokas nur al la individua konscienco.

jakuo

Enkonduko en muzikon


Gitaro havas ses kordojn. La tri plej akutajn oni faras el plastika materialo, *najlono*, kaj la aliaj tri povas esti faritaj ankaŭ de tiu materialo, aŭ de silko, sed oni ĉirkaŭmetas ĉiun el ili per metala fadeno, kiu pezigas la kordon sufiĉe, por ke ĝia *voĉo* malaltiĝu. Oni diras, sekve, ke la *animo* aŭ *spirito* de tiuj kordoj estas *silka* aŭ *najlona*.

La kordoj estas ligitaj al *kapo* de gitaro per *klaviĥoj* aŭ *kejl*oj, kiuj estas ruleblaj pecetoj da ligno, kiu ingas en la kapon. Hodiaŭ la klaviĥoj estas metalaj, kaj havas meĥanismon kun dentradoj, por certigi, ke la kordo ne maltensias subite, kiel povis okazi en la istempo. Je la alia fino, la kordojn oni ligas al *ponto*, horizontala ligna peco kun ses truoj, kiun oni gluas al *koverto* de gitaro.

La kordojn oni agordigas al tiuj notoj: mi, la, re, sol, si, mi. Oni skribas gitaran muzikon per klavo de sol (g, germankutime), sed oni ludas tiun muzikon unu oktavon pli malalte. Tio signifas, ke gitaro estas instrumento *transmetanta*, pro tio, ke oni skribas muzikon per malsama *tesituro* ol ĝi sonas.


Por agordi gitaron, oni bezonas referencan sonon. Oni vendas apartan fajfilon, kiu estas nomita ĉe ludantoj *diapasono*. Fakte ĝi estas membrano, kiu vibras en cilindreto je *frequenco* de 440 fojoj ĉiun sekundon. Tio estas la sono de la noto *la*, kiu troviĝas je la 3-a kordo premata je la 2-a *trasto*, la 5-a je la 12-a, la 4-a je la 7-a *trasto*, kaj unu oktavon pli alte je la 2-a je la 10-a, kaj la 1-a kordo je la 5-a *trasto*. Sed estas plej facile ludi la 5-an kordon *malferme*, tio estas, sen premi ĝin ie ajn, kaj alĝustigi per la koncerna klaviĥo ĝis ambaŭ kordoj sonas *kohere*, tio estas, bele kunaj, pro tio, ke la 5-a kordo malferme sonas unu oktavon pli malalte ol la diapasono.

Nun ni jam agordis nian gitaron, ni sekve povas formi *akordon* per ĝi: ni premu la 5-an kordon je la 3-a per la fingro 3-a de la maldekstra mano, la 4-an kordon je la 2-a *trasto* per la 2-a fingro, kaj la 2-an kordon per la 1-a fingro, kaj ni ni *pulsu* (frotu per la dika dekstra fingro) la tutan kordaron. Ni aŭdas nun la akordon de *Do majora*, kiun ni *reprezentas per la apuda diagramo*. Rigardu,



ke tiuj kordoj ne premitaj havas 0-jn sur ili, se ili -aldone ne sonas, estas X sur ili. Preskaŭ ĉiun kanton oni povas akompani per tri akordoj: tiu de la *toniko* -aŭ ĉefa noto

en la *tonalo*-, la *subdominanto* kaj la *dominanto* aŭ *superreganta grado*. Ni scias, ke la notoj estas *do re mi fa sol la* kaj *si*. Se ni nombrigas ilin de la 1-a al la 7-a, ni diras, ke la *unua grado* estas *do*, la *dua grado* estas *re*, kaj tiel plu. Tial, ni povas havi la saman diferencon inter la samaj gradoj -rilate la sono- senrilate al la vera alteco de la notoj, kaj eltiri ĝeneralajn leĝojn muzikajn. Sekvas el tio, ke la plej gravaj gradoj estas la *toniko* (unua grado), *subdominanto* (kvara) kaj *dominanto* (kvina). Por konstrui la akordon de *dominanto* aŭ *dominantan akordon* en la tonalo *do majora* (ja *toniko* nomigas la tutan tonalon), ni bezonas trovi la kvinan gradon de *do*, kiu estas *sol*. Nun ni trovas intervalon *de tria*, tio estas, sol-la-**si** kaj de *kvina*: sol-la-si-**do-re**. Jen la akordo: sol-si-re, kies akordon ni ankaŭ montras ĉi supre.



La venontan numeron ni prezentos la akordon de *subdominanto*. Per ili tri ni akompanos nian kanton.



BULTENO DE HISPANA ASOCIO DE LABORISTOJ ESPERANTISTAJ (HALE)

REDAKCIO: Poŝtkesto 4461,
E30080 MURCIA,
HISPANIO

74^o (00 34) 652 166 323

Retskribu al
jheras1@aliso.pntic.
mec.es

ALVOKO AL ĈIUJ HALE-ANOJ

MEMBROJ DE S.A.T.

La sekretario de la Ĝenerala Konsilantaro de S.A.T. petis al la prezidanto de H.A.L.E. la plenumadon de la S.A.T Statuto en la paragrafo 15^a ĜENERALA KONSILANTARO, alineo Ĉ, en kiu pri la konsisto de la ĜK diras: «unu reprezentanto de ĉiu L.E.A. ligita kun S.A.T».

Se iu kamarado deziras helpi la Asocion kaj sin proponi por reprezenti H.A.L.E. en la ĜK bonvolu sin anonci al la prezidanto de H.A.L.E kiel eble plej rapide.

Marteno